



VIVO DE WILLIBRORD
ĈEFEPISKOPO DE UTREĤT

Verkis Alkuin kaj Thiofrid
Tradukis Gerrit Isai Berveling



Willibrord

Willibrord-Klemento¹ el Northumbrio, la fondinto de Klostro Eĥternaĥ, la apostolo de la Frisoj, preskaŭ duonjarcenton laboris misiiste (690-739), sed li ne vaste famiĝis. Por tio ofte helpas morti martire, kio al li ne okazis. Ĉe sia misiada laboro ofte li kunlaboris kun la ŝtato de la Frankoj. Karolo Martelo donis al li Utreĥton kiel bazon por lia laboro. De tie inter Rejno kaj Vezero li diskonigis la evangelion, ĝis li transdonis siajn vivlaboron, gloron kaj meritojn al sia kunbatalanto, la populara Bonifaco, la apostolo de la Germanoj.

Alkuin

La vivraporto de Alkuin en multaj rilatoj sekvas antaŭajn tradiciojn ek de Plutarĥo² – kun propraj kristanaj novigoj, i.a. pri postmortaj mirakloj.

Alkuin de Reĝo Karolo la Granda ricevis la taskon klerigi lin, instrui lingvojn al li ktp, kaj ankaŭ bibliotekon li prizorgu. Poste plurajn vivraportojn li verkis, i.a. pri Karolo mem same kiel ĉi tiun. Ties tradicia ordigo estis: vivo – vivkutimoj – mirakloj.

Thiofrid

En 1104 en la klostro de Eĥternaĥ la abato Thiofrid prenis la kuraĝon stiliste plibeligi la historion de Willibrord. Post la tempo de l' Karolida Epoko la gusto komplete ŝanĝiĝis. Ankaŭ politike kaj kulture la mondo fariĝis nova. Malaperis la epoko de l' vagandaj misiistoj, la insuldevenaj Anglosaksoj kaj Iroj, eĥ la misiado al obstinaj Nordgermanoj jam pasis kaj Frislando estis integra parto de la Sankta Romia Imperio. La atakdirekto nun koncentriĝis orienten: la Papo Urbano la 2a dum la Koncilio de Clermont en 1095 mobilizis la amasojn por „purigi” la Sanktan Landon de l' Islamanoj sub la moto ‚deus lo volt’ (Dio ĝin volas). Mallonge antaŭ ol Thiofrid komencis skribi, Jerusalem sub granda sangoverŝado estis konkerita de

¹ La duan nomon li ricevis de Papo Sergio.

² Tio estis alia arto ol la vera historio. Kleio – muzo de Historio; Kalliopa – muzo de Heroa Epopeo.

Krucmilitistoj, kiuj komence de l' Rejnregiono en „sankta kolero” murdis milojn da Judoj. Certe ne ideala cirkonstanco por celebri Willibrord-Klementon.

For estis la epoko, kiam senprobleme miksiĝis/kunlaboris ŝtataj kaj ekleziaj funkciuloj sen timo esti kulpigota pri simonio. Estis epoko de la kluniza reformo. Do la senproblema kunlaboro inter episkopo kaj ĉefservisto ne plu eblis.

Aŭgustino donis la ekzemplon por uzado de klasikaj tekstoj: oni imitu la Judojn, kiuj forirante el Egiptujo kunprenis trezorojn de l' postlasitaj najbaroj. Do same agis Thiofrid – ĉe li Willibrord profitas el Vergilio, Boecio kaj Salustio.³ En epoko, kiam senprobleme por nova katedralkonstruado pecojn oni uzis el antikvaj monumentoj, Thiofrid same faris en sia verkado pri Willibrord kun citoj el antikvaj tekstoj.

Malgraŭ sia kritiko al Alkuin, ke plurajn sciindaĵojn li preterlasis, Thiofrid tion ne korektis – male: enhance li efektive sekvas la antaŭulon. Tamen eniras kelkaj novaĵoj en la rakontmanieron: la prahistorio de lia naskiĝo enkondukas filozofian temon, kiu preteras la simplecon de Alkuin: deirante de Platona makrokosmo-mikrokosmo-analogio Willibrord fariĝas ĉe li kvazaŭ stelo sur brila loko en la kosmo.⁴

Gerrit Isai Berveling
la 25an de januaro 2025
gerritberveling@ziggo.nl

Fonto

Hans-Joachim Reischmann
Willibrord - Apostel der Friesen
Seine Vita nach Alkuin und Thiofrid
Lateinisch-Deutsch
Darmstadt, Wissenschaftliche Buchgesellschaft, 1989

³ Vidu la piednotojn ĉe la tradukitaj pecoj.

⁴ Unua ĉapitro.

Antaŭparolo

Al la plej eminenta kaj laŭdinda Sinjoro Ĉefepiskopo Beornrad prezentas siajn salutojn la humila servisto Alkuin.

Kiam la leteron de via alteco ni ricevis, en kiu vi esprimis vian dediĉon al la Sinjoro kaj vian daŭran atenton pri Liaj ordonoj, mi devas konfesi, ke mi grande ekĝojis. Sed tamen mi ja neniamaniere min kredas kapabla por via intenco, ĉar mi ne povas apogi je stilismaj kapabloj, por tion realigi, kion vi taskigis al mi, kaj se min ne pelus la amo, kiu kutimas nei nenion, tiam mi ne kuraĝus ekpreni tiun ĉi taskon, kiu superas miajn simplajn kapablojn.

Tamen laŭ via peto, helpate de Dia graco kaj ĉar favoris tion la plej sankta Patro Willibrord, kies vivon, kutimojn kaj miraklojn vi min petis piafervore priskribi, viajn indikojn, sankta Patro, mi obeis kaj du libretojn mi verkis⁵ – unu en proza rakont-stilo, kiu, se al via saĝeco ŝajnas inde, en la preĝejo publike povas esti voĉlegata al la fratoj; la alia en poezia metriko, kiu nur en dormĉambra sekreto inter viaj lernantoj devus resti remaĉata.

Ambaŭ siatempe estis diktataj inter la dumtagaj devoj ĉe kaŝaj noktaj okupiĝoj, kaj des pli bezonas vian defendon, ju malpli ili estis poluritaj de la aŭtoro mem. Mia tasko estis ne neglekti la aŭtoritaton de la ordonanto; la via estas ŝirmi la senspertan de la obeanto.

Mi ankaŭ aldonis al la unua libreto unu predikon⁶, pri kiu mi esperas, ke ĝi meritas esti eldirata de via honorinda buŝo al la popolo.

Post la dua libreto mi aldonis elegion pri la honorinda viro Wilgis, la patro de la plej sankta episkopo Willibrord, kies korpo ripozas en eta monaĥa ĉelo ĉe la maro, kiun mi, kvankam neinda, kun la graco de Dio, kiel legitiman posedaĵon prizorgas.

Sed ĉio, kion mi diktis, ĉu en prozo, ĉu en metrika formo, atendas la juĝon de via sankteco, ĉu estas inde transdoni ĝin al la posteuloj, aŭ ĉu ĝi estu forigita per la malmola pumiko; ĉar nur post kiam vian prijuĝon ĝi eltenis, ĝi povos aperi antaŭ la publiko.

⁵ Nur la unua enestas en ĉi eldono.

⁶ Mankas en ĉi eldono.

Ĉapitro 1

Pri la patro Wilgis

Estis sur la insulo Britanio, en la provinco Northumbrio⁷, familiopatro de Saksa deveno, nomata Wilgis, kiu kun sia edzino kaj sia tuta familio, kiel poste diskoniĝis per mirakloj, vivis pie kaj kristane.

Ĉar post kiam sian ĉi-teran vivstilon li cedis, li elektis la monaĥan vivmanieron kaj baldaŭ poste, kiam en li kreskis la deziro plispiritualigi sian vivstilon, en flama idealismo li sin dediĉis al la ermita vivado en la promontoro, kiun ĉirkaŭfluas la Oceano kaj la rivero Humbro. Tie longtempe Dion li servis en eta preĝejeto, kiun li dediĉis al la sankta apostolo Andreo, per fastado, preĝoj kaj vigiloj, tiel ke per mirakloj li koniĝis kaj famiĝis lia nomo.

Kaj li ne hezitis per alloga predikado de la Parolo de Dio admoni la al li alfluantajn amasojn. Sed ĉe la reĝo kaj la princoj de tiu popolo li atingis tian honorecon, ke ili transdonis al li kelkajn terenojn kiel nerevokeblajn donacojn por konstruado de sanktejo. Tie la sankta Patro kunigis modestan, sed honorindan komunumon da servistoj de Dio; kaj tie, post diversaj bataloj de sankta laboro de Dio kronite, li trovis sian lastan ripozejon, kaj liaj posteuloj konservis tiun posedaĵon en sia sankta tradicio ĝis la hodiaŭa tago.

Laŭ meritoj kaj laŭ rango ilia malsuperulo, en legitima tradicio mi transprenis tiun preĝejon por konservado, mi, kiu laŭ via instigo, honorinda Patro Beornrad, verkis ĉi tiun biografion pri la sankta Patro kaj saĝa Instruisto Willibrord. Pro la Didonita graco, vi ja ekagis kiel plej inda heredanto de ĉi tiu sankta Patro – laŭ valoro de via sankta ofico samkiel koncerne la kultadon de la sanktaj lokoj, kiuj estis konstruitaj honore al Dio.

Ĉapitro 2

La vizio

Por nun rekonstrui la antaŭhistorion de la naskiĝo de la sankta Patro Willibrord kaj baldaŭ la antaŭsignojn de lia Dia elekto jam en utero de la patrino, mi nun reiru al la punkto, de kie mi ekis.

Ĉar kiel la antaŭiranto de nia Sinjoro Jesuo, la sankta Johano Baptisto, de la

⁷ Northumbrio sur la Britaj insuloj havis duoble gravan rolon: unue sub reĝo Ecgfrith, kiu batis la Piktojn, inter la Heptarĥio (Sep-reĝaro) ĝi havis gvidan rolon, kiun tamen post lia morto en 685 ĉe Mercia ĝi perdis. – Poste sub lia posteulo Aldfrith, kiu, edukite laŭ Ira kutimo, subtenis Monaĥej-konstruadon kaj -bibliotekojn, kio rezultis en serion da gravuloj: krom Willibrord ankaŭ Ecbert, la abato de Melfont, Beda Venerabilis kaj ankaŭ Alkuin mem.

patrina utero jam estis sanktigita, devenante de plej sanktaj gepatroj, kiel rakontas la evangelio, kvazaŭ lumportanto antaŭiranta Kriston, la Sunon, por al multaj homoj porti la saviĝon –⁸, tiel ankaŭ la sankta Willibrord naskiĝis sava kaj bona por sennombraj homoj kaj, kiel klare montriĝas, estis infano de piaj gepatroj.

Ĉar la honorinda Wilgis, pri kiu jam mallonge ni parolis, laŭ Dia providenco nur tial eniris nupton, por ke je beno al multaj popoloj divenu el li tia infano.

Tial lia edzino, la estonta patrino de la sankta Patro Willibrord, en noktomeza senbruo dumdorme vidis ĉielan aperaĵon. Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ je la firmamento Novlunon ŝi ekvidas, kiu kreskis, ĝis ĝi impresis kvazaŭ Plenluno. Dum tiun ŝi rigardis pli atente, subite en ŝian buŝon ĝi enfalis; apenaŭ ĝin ŝi englutis, kaj jen ŝia interno brilegis je granda gloro. Kiam timplena ŝi vekigis, ĉi sonĝon ŝi rakontis al pia pastro; kaj kiam tiu informigis, ĉu tiunokte, kiam ĉi sonĝon ŝi vidis, laŭ kutima maniero kun sia edzo si sekskuniĝis, kaj kiam tion ŝi jesis, li jene respondis:

„La Luno, kiu antaŭ viaj okuloj el etaĵo diskreskis ĝis grandaĵo, estas la filo, kiun tiunokte viautere vi koncipis. Per la lumo de la Vero la erarojn de l' mallumo li disrompos kaj, kien ajn li atingos, ĉirkaŭate de la aŭro de la lumo ĉiela, la plenen de sia perfekteco li montros, kaj per la brilo de sia karaktero la atenton de multaj li direktos al si.“

Al tiu ĉi sonĝo kaj ties klarigo tuj sekvis la efektiviĝo.

Ĉapitro 3

Nova Samuel

Okazis post forpaso de tagoj, la virino naskis filon, kaj kiam en la sankta fonto de la bapto li renaskiĝis, la patro donis al li la nomon Willibrord, kaj post kiam li ne plu trinkis la patrinan lakton, tuj lia patro transdonis lin⁹ al la religiaj patroj de la klostro Ripon¹⁰ por eduki lin en la kristana doktrino kaj la sanktaj skriboj – kun la intenco, ke la ankoraŭ neformita aĝo per la tieaj ekzercoj fortiĝu, se li vidus nur honorindaĵojn kaj aŭdus nur sanktaĵojn.

La Dia graco ebligis al li, ke de infanaĝo spirite li kresku kaj karaktere li firmiĝu,

⁸ Laŭ Luko 1:15.

⁹ La transdono de neplenaĝuloj – Willibrord tiutempe estis ĉ. 6-jara – jam en La Regulo de Benedikto (ĉ 59) estis detale organizita. Dum en Frua Mezepoko tiu ‚transdono‘ estis ĝenerale akceptita – inter la plej famaj apud Willibrord ni menciuj pri Bonifaco, Notker la Balbutulo de St. Gallen kaj Hermann la Lamulo de Reichenau –, poste estiĝis kreskanta kritiko kontraŭ ĝi; Ĥrabanus Maurus sin vidis devigita, per verkaĵo defendi ĝin. Per la reformmovado de Kluny tiu ĉi kutimo malaperis finfine.

¹⁰ La Klostro Ripon estis fondita de Wilfrid (634-710) kiel fondaĵo de la northumbria reĝo Alfrith. Wilfrid samtempe estis abato de la Klostro Ripon kaj ĉefepiskopo de York. Li ege influis la junan Willibrord. La rekta ligiteco al Romo devenas de Wilfrid – same poste Willibrord.

kiom eblas je tia aĝo, tiel ke oni povus kredi, ke en nia epoko naskiĝis nova Samuel, pri kiu estis skribite: „La knabo Samuel kreskis kaj plaĉis al Dio kaj homoj“¹¹.

Tie, en la menciita klostro, la knabo, kiu estis destinita por beno al multaj, ricevis la tonsuron de la klerikoj kaj per pia voto sin faris monaĥo; kune kun la ceteraj samaĝuloj de ĉi monaĥejo li estis edukita. Antaŭ neniu li cedis en entuziasmo, neniu lin superis en la necesa humilo kaj de neniu li estis venkita en sindediĉo al la Skriboj.

Sed la knabo ĉiutage tiel progresis, ke kun la matureco de sia karaktero sian junan aĝon li pli superis: kaj li fariĝis adolta en sia komprenpablo, dum fizike li restis ankoraŭ tre fragila.

Ĉapitro 4

Religia pilgrimado

Dum ĉi benata junulo do avancis en la sankta erudicio kaj en ĉia sobereco kaj plej feliĉa mora honesto, li ekflamis de profunda deziro al sanktigita vivado kaj de sopiro al Pilgrimado.

Li aŭdis, ke en Irlando la kristana instruo atingis speciale altan nivelon, kaj lin instigis krome, ke la famo rakontis pri la vivovojo de kelkaj sanktaj viroj, precipe la sankta patro kaj episkopo Ecbert, kiu ricevis la kromnomon ‚la Sanktulo‘, kaj la reverenda pastro Wicbert, kiuj ambaŭ pro amo al la ĉiela Patrujo forlasis hejmon, patrujon kaj parencojn por migri al Irlando, kie longe diste de ĉi-teraj devoj kaj en plena sindediĉo al Dio ili rikoltis la plej dolĉajn fruktojn de Dia meditado.

Kun la intenco, imiti ties fido-forton, kaj kun la beno de sia abato kaj de siaj klostrofratoj, la Dibenata junulo rapidapaŝe migris al Irlando, kie kun la menciitaj patroj en amikeco li kuniĝis, por kiel saĝa eta abelo el la kontakto kun ili elsuĉi la nektarajn fruktojn de la fido kaj en la abelujo de sia koro konstrui la plej dolĉajn teksaĵojn de noblaj virtoj.

Tie dek du jarojn estis edukata de eminentaj instruistoj de la Kristana Religio kaj de la Sankta Skribo la estonta misiisto de sennombraj popoloj, ĝis li elkreskis je perfekta viro kaj la aĝo de matureco en Kristo.

Ĉapitro 5

Vivo aktiva

Je la aĝo de 33 jaroj ĉe la eminenta viro riveligis deinterne ĉiam kreskanta fido-flamo, tiel ke al li ŝajnis nekontentige, nur pro sia propra persono esti ŝvitinta por

¹¹ 1 Samuel 2:26.

sanktiĝo, se ne ankaŭ por aliaj li estus profita en la predikado de la vero. Li aŭdis, ke en nordaj¹² regionoj estas ja granda rikolto, sed malmultaj laborantoj¹³.

Sed por ke plenumiĝu laŭ Dia ordigo la vero de sonĝo, kiun iam havis pri li lia patrino – kiel ŝi atestis – en plena konscio pri sia volo, kvankam ankoraŭ ne sciante pri Dia ordigo, al tiuj regionoj navigi li pensis kaj, se estus Dia deziro, prilumi per la brilo de l' helega evangelio la popolojn, kiuj tie rigidiĝis per longdaŭra malfido, li surŝipe kunprenis kun si dek unu fratojn¹⁴, kiuj havis la saman fido-fervoron, kiel li mem.

Kelkaj el ili poste, dank' al sia obstino ĉe la predikado de la evangelio, estis kronitaj per la martir-morto, dum aliaj, kiuj ricevis la ordinon de la episkopeco post laboro ĉe la sankta predikado, mortis en paco.

Tiu viro de Dio, kiel ni rakontis, ŝipveturis, ĝis siajn velojn kun prospera vento li demetis ĉe la buŝo de la rivero Rejno; tie sur la bonvena sektero ili sin refreŝigis, kaj baldaŭ la kastelon Utreĥt ili atingis, kiu kuŝas tuj ĉe la bordo de la ricevo; kaj tie post mallonga tempo pro Dia graco kaj ĉar la Parolo de la kredo kreskis, la sankta Willibrord ekhavis la Seĝon de sia Episkopejo.

Sed ĉar la tribo de la Frisoj, en kies regiono tiu kastelo estis konstruita, kun sia Reĝo Radbod ankoraŭ kuŝis en la malpuro de paganaj moroj, la homo de Dio decidis rapidi en la Regnon de l' Frankoj kaj aliri al ilia duko Pipino¹⁵, viro brava, kiu famis pro siaj sukcesoj kaj kiu karaktere estis honesta.

Ĉi tiu akceptis lin kun ĉia honoro, sed ne volis, ke li aŭ lia popolo perdu tian gloran klerulon. Li do indikis al li konvenan terenon interne de siaj limoj, kie la dornojn de la idolodoro radikale li ekstermu kaj la purajn semojn de l' parolo de Dio li riĉe disŝutu, por ke plenumiĝu la diroj de la Profetoj: „Plugu al vi novan plugokampon, kaj ne semu inter dornaĵo“¹⁶.

Ĉapitro 6

Kion volis Pipino

Kiam la Viro de Dio, dum diligente tra la unuopajn lokojn li kuris, plenumis la deziratan laboron de la Evangelizado, kaj kiam la Semo de la Vivo, priverŝita de l'

¹² Evidente el la vidpunkto de Alkuin, kiu loĝis en Akeno.

¹³ Laŭ Mateo 9:37-38.

¹⁴ Por simboli la 12 apostolojn?

¹⁵ Pipino la Meza (640-714) post batalo ĉe Tertry ĉe la rivero Somme efektive regis la regnon de la Frankoj, kvankam oficiale li rekonis la „reĝon“ Theuderik la 3an; sed la Arnulfidoj – lia familio – fakte regis. Li protektis la misiadon de Willibrord.

¹⁶ Jeremia 4:3.

roso de la Dia Graco, pro ilia predikado suprenŝprucis ĉie sur la kamparoj de l' koroj de multaj, la menciita Franko-duko ĝojis pro lia sankta engaĝiĝo kaj pri la sankta disvastiĝo de l' Parolo de Dio. Kun la celo atingi ankoraŭ pli grandan rezulton, en prudenta planado li volis sendi lin al Romo, por ke la Papo Sergio¹⁷, la plej alta spirita aŭtoritatulo de tiu epoko, oficiale levu lin al honorplena episkopa rango: ricevinte la apostolan benon kaj elsendon, li des pli plenfide estu forsendita kaj fortigita por reiri al sia misiada laboro, laŭ la diro de la apostolo:

„Kaj kiel oni heroldu, se oni ne estas sendita?“¹⁸

Kiam la Homon de Dio al tio li provis instigi, tiu unue kontraŭis kaj tenis sin je sia starpunkto, ke la honoron de tiel alta ofico li ne meritas. Elnombrinte la kriteriojn de la Apostola sanktiĝo, li deklaris, ke la postulojn de tiu katalogo da etikaj kvalifikoj li ne kapablas plenumi, kiun la mirinda Apostolo de la Paganoj elnombris, kiam sian spiritan filon Timoteo li instruis pri la episkopa ordino.¹⁹

Sed la Duko en religia senco konsilis je tio, kion la Viro de Dio pro humilo kontraŭis. Fine venkite de ĉies instigoj kaj, kio diras ankoraŭ pli, pelite de l' Dia Ordigo, li konsentis – ne laste, ĉar li volis submetiĝi al la konsilo de la plimulto prefere ol trapeli sian propran necedemon. Kaj tiel kun respektinda delegitaro kaj donacoj, kiuj decas al apostola aŭtoritato, li estis sendita al Romo.

Ĉapitro 7

Ĉefepiskopo ‚Klemento‘

Sed la kvaran tagon antaŭ lia alveno tien la Sankta Patro²⁰ dumdorme estis avertita de anĝelo, ke tiun li akceptu kun la plej alta honoro, kaj ke neniun el ties deziroj li malakceptu, ĉar li estas la onta lumentanto por multaj animoj, kiun Dio elektis kaj kiu tiucele venis, ke de li la honoron li ricevu de la plej alta pastreco, kaj ke nenio al li estu negata, kion li petus.

Certigita de tiu admono, li akceptis lin kun granda ĝojo kaj multa honoro; kaj tuj kiam li rekonis en li la fajron de la Fido, la humilan Sindediĉon kaj la plendon de Saĝo, je antaŭfiksita dato, kiam la popolo alfluis kaj la honorindaj pastroj por asistado estis invititaj, publike li ordinis lin en la Preĝejo de l' Princo de la Apostoloj Petro²¹ kiel Ĉefepiskopon. Kaj post la ordino li donis al li la nomon „Klemento“, vestis lin en la

¹⁷ Sergio la 1a, 687-701.

¹⁸ Romanoj 10:15.

¹⁹ 1 Timoteo 3:1-7.

²⁰ La papo.

²¹ Laŭ Beda tio okazis tamen en la Preĝejo de Sankta Cecilia; okazis dimanĉe 21 nov 695.

pastra kostumo kun la sankta paliumo de lia ofico, same kun la mantelo de Aaron²², kaj firmigis lin per la gloro de lia aspekto, kaj kiom li deziris aŭ petis, li cedis al li – ĉu en ŝirmado per relikvoj de sanktuloj, ĉu en ekleziaj aferoj, tutkore kaj ĝoje. Kaj fortigitan de la beno, riĉigitan de bonfaraj ordonoj li resendis lin ree al la Misiada tasko.

Ĉapitro 8

Sendita de Pipino

Post ricevo de l' beno de la Apostola aŭtoritato, kiel engaĝita Predikanto de l' Parolo de Dio plenkonfide li reiris al la menciita Duko de l' Frankoj.

Tiu bonvenigis lin kun plej alta honoro kaj dank' al sia Ofico li indikis al li la taskon evangelizi, precipe tamen en la plej nordaj partoj de sia regno, kie ĝis tiam pro rareco de instruoj aŭ pro la duro de la loĝantaro la flamo de la Fido ankoraŭ malmulte ekflamis. Tien la Homo de Dio en tiuj regionoj do disŝutis la semojn de l' vivo, ju pli li travidis la neceson forpeli la malnovan malsaton de l' senscio.

Kian frukton kun helpo de la Dia Graco en tiuj regionoj li kreskigis, atestas ĝis nun la popoloj ĉie en la urboj, vilaĝoj kaj kasteloj, kiujn per sia Dibenata predikado li kondukis al adorado de l' unusola kaj ĉiopova Dio. Atestas ĝin same la eklezioj, kiujn en la diversaj lokoj li konstruis; atestas ĝin same la komunumoj de la Servantoj de Dio, kiujn en la kelkaj lokoj li kunigis.

Ĉapitro 9

Paganaj reĝoj honore lin bonvenigas

Tiu Viro de Dio ankaŭ provis eĉ trans la limoj de la Frankolando fluigi la riverojn de l' ĉiela instruo. Ĉar li ne timis tiuepoke aliri la Reĝon de l' Frisoj Radbod, kiu kun sia tuta popolo vivis en paganismo kaj, kien kondukis lin lia vojo, plenkonfide eldiri la Parolon de Dio. Sed la menciita Reĝo de l' Frisoj, kvankam la Viron de Dio respekte li rigardis, tamen sian ŝtonan koron ne lasis eĉ nur iom moliĝi per la varmaj paroloj de l' vivo. Kaj dum la Viro de Dio agnoskis, ke ĉe li ne eblas kreskigi fruktojn, li direktis sian evangelizadan vojon al la plej ferocaj popoloj de la Danoj.

Sed tie, kiel oni diras, regis tiutempe Ongendus²³, homo pli terura ol sovaĝa besto kaj pli dura ol roko, kiu tamen laŭ Dia ordono la Predikanton pri la Vero traktis

²² Eliro 29:5.

²³ Ongendus – historie ne bone fiksebla persono, kiu prefere eble hejmas en la Beowulf-epopeo (post 730).

respekte. Sed tiu trafis viron, kiu malmoliĝis en moroj kaj sin dediĉis al idoladorado kaj havis nenian esperon je pli bone vivstilo; do tiam tridek knabojn li prenis kun si el tiu lando kaj rapide reiris al la de Dio elektitaj popoloj de l' Regno de la Frankoj.

Sed ankoraŭ dum tiu vojaĝo la samajn knabojn kateĥizitajn li purigis per la akvo de la vivo, por ke li ne plendu pri ia perdo ĉe ili okaze de la danĝeroj de l' longa marvojaĝo aŭ la malamikeco de la loĝantaro de tiu lando; ĉar la ruzojn de l' malnova Malamiko li volis preventi kaj la gajnitajn animojn firmigi per la Sakramento de l' Sinjoro.

Ĉapitro 10

La provoko

Kaj dum la pia predikanto de l' Parolo de Dio daŭrigis sian vojon, li atingis en limregiono de Frisoj kaj Danoj iun insulon, kiu de la loĝantaro laŭ ilia Diaĵo Fosite nomiĝis Fositesland, ĉar sur ĝi estis konstruitaj sanktejoj de tiu Diaĵo.

Tiun lokon la paganoj tiel respektis, ke neniu inter ĉi popolo kuraĝis ektaŭsi eĉ unu el la tie paŝtiĝantaj bestoj aŭ ian ajn objekton, aŭ nur kuraĝis ĉerpi la akvon, kiu ŝprucis el la tiea fonto, se ne en plena silento.

Kiam la Viro de Dio de ia ŝtormo tien peliĝis, kelkajn tagojn tie li restis, ĝis la ŝtormoj kvietiĝis kaj reaperis favora tempo por marnavigado. Sed ne multe atentante pri la stulta loka religio aŭ la tre feroca temperamento de la reĝo, kiu kutimis kondamni al plej kruela mortopuno la homojn, kiuj profanis tiujn sanktaĵojn, tri homojn en tiu fonto li baptis, alvokante la Sanktan Triunuon, sed ankaŭ ordonis al la siaj buĉi por la manĝo kelkajn bestojn, kiuj paŝtiĝis tiuloke.

Kiam tion vidis la paganoj, ili kredis, ke tiuj homoj fariĝis frenezaj aŭ pereos per rapida morto. Kiam ili konstatis, ke nenion malbonan ili suferis, timoplene tamen ili raportis al sia Reĝo Radbod, kion ili vidis okazi.

Ĉapitro 11

Pri la miro de Reĝo Radbod

Eksplodinte en senlima kolero kontraŭ la Pastro de la Vivanta Dio kun la intenco venĝi la misfarojn kontraŭ siaj Dioj, dum tri tagoj laŭ sia kutimo trifoje li metis la sorton; sed neniam la sorto de l' kondamno povis fali sur Sklavon de Dio aŭ iun el ties homoj, ĉar la vera Dio ŝirmis la siajn. Nur unu el la kunuloj estis sorte indikita kaj ricevis la martiran kronon.

Sed la sanktulo estis vokita al la reĝo kaj tiu lin akre atakis, kial li ja kaŭzis malbonon al lia Dio. La proklamanto de la vero tamen kun neskuita kuraĝo respondis

al li:

„Ne estas Dio, kiun vi adoras, sed la Diablo, kiu per pereigaj miskredoj blindigis vin por transdoni, ho Reĝo, vian animon al la eterna fajro. Ja ne estas Dio krom la Unu, kiu kreis ĉielon kaj teron, la maron kaj ĉion, kio estas en ĝi: Kiu per vera fido adoras Tiun, tiu posedos eternan vivon.

Kiel Lia sklavo hodiaŭ mi atestas al vi, ke de la Nenieco de la antikva eraro, kiun adoris viaj patroj, nur iom vi bezonos flankeniri kaj, kredante je la unu Dio ĉiopova, nia Sinjoro Jesuo Kristo, kaj baptite en la fonto de la vivo, ĉiujn pekojn viajn vi forpurigos kaj, deĵetinte ĉiun malbonon kaj maljuston, estonte vi vivos kiel nova homo en ĉia sobro, justo kaj sankteco.

Se tion vi faras, tiam kun Dio kaj liaj sanktuloj eternan gloron vi rikoltos. Sed se min vi malŝatas, kvankam vojon al saviĝo mi indikas, tiam vi estu certigita, ke la eternan kondamnon kaj la infernan fajron kune kun la Diablo, al kiu vi servas, vi suferos!“

Ĉe tio la reĝo mirplena respondis: „Mi vidas, ke miajn minacojn vi ne timis, kaj ke viaj Diroj similas viajn Farojn“.

Kiam ankaŭ al la Predikanto de la Vero li ne volis kredi, tamen li resendis lin kun honoro al la Franka reĝo Pipino.

Ĉapitro 12

Misio – Ekspansio – Organizateco

Tiu ĉi, ĝoja pro lia alveno, petis lin celkonscie daŭrigi la taskon de l' misiado pri la Parolo de Dio kaj, tuj kiam la dornoj de l' idoladoro deradike estos nuligitaj, daŭre semi la Parolon de Dio en la unuopajn regionojn.

La pia predikanto estis ĝisfunde okupita tion realigi, dum li ĉirkaŭvagis tra ĉiuj regionoj de tiu ĉi lando, tra urboj, vilaĝoj kaj kasteloj, kie antaŭe li jam predikis la Evangelion, kaj ĉiujn li admonis ke kun bona intenco ili restu ĉe la bona intenco firmigi la veran Fidon.

Kaj dum de tag' al tago kreskis la nombro da prozelitoj kaj alfluis ĉiam pli granda amaso da konvinkitaj Kristanoj, por turni sin al la Dia Parolo, ĉiam pli multaj, kaptitaj de la fajro de la Fido, komencis disponigi sian patran heredaĵon.

Post kiam Willibrord tiujn ricevis, li baldaŭ igis konstrui preĝejojn sur tiuj terenoj kaj ĉie en ili li enoficigis pastrojn kaj akompanantojn por si mem por predikado de la Parolo de Dio, por ke la nova Popolo de Dio havu lokojn, kie ĉe festotagoj ili kunvenu kaj povu aŭskulti la savan predikadon, aŭ de kiuj la donon de la sankta bapto ili ricevu kaj la instruojn lernu de la Kristana Doktrino.

Kaj tiel la Homo de Dio, benata de Dia Graco, de tag' al tago faris ĉiam pli grandajn progresojn.

Ĉapitro 13

La Ĉefepiskopo de Utreĥt

Okazis tamen, ke la Duko de l' Frankoj, Pipino, mortis kaj ke lia filo Karolo akiris la regnon de sia patro²⁴. Multajn gentojn li aldonis sub la potencon de la Frankoj, inter kiuj estis ankaŭ la Frisoj, kies regionon post venko pri Radbod li aldonis al sia patra Imperio.

En tiu popolo tiam estis aktiva la sankta Willibrord kiel misiisto kun la episkopa seĝo en la kastelo de Utreĥt. Kiam tiu ricevis pli vastan eblon por sia evangelizado, li klopodis por per la sankta bapto purigi la ĵus per la glavo akiritan teritorion.

Kaj li ne toleris, ke tie nur io ajn el la praa sencio de l' antaŭa erarado restu kaŝita, sed ĉion per la lumo de la Evangelio sen ajna prokrasto li priŝutis, tiel ke en tiu popolo subite realiĝis jena profeta atesto:

„Kaj tie okazos, ke al ili oni diros: ‚Ne mia popolo vi estas; estos dirite al ili: Filoj de la Vivanta Dio’²⁵.“

Ĉapitro 14

Mirakloj – „Mia estas la venĝo“

Ankaŭ plurajn miraklojn la Dia forto plenumis pere de sia Servisto. Se eĉ la Servado de l' Evangelio preferindas je ĉia Miraklofarado, do tamen mi opinias, ke tiuj agoj, kiujn pri li oni rakontas, je la gloro de Dio, kiu ilin ebligis, ne rajtas esti prisilentitaj, sed prefere estu fiksitaj en skribo, por ke por la mondo ne pereu, kio okazis en pasinteco.

Je certa tempo, dum la honorinda viro iris sian kutiman vojon evangelizante, li venis ĉe certa urbo nomata Walaĥrum²⁶, kie postrestis Idolo de l' praa miskredado. Kiam la Homo de Dio antaŭ la okuloj de la gardisto de tiu kultloko en brula fervoro ĝin frakasis, tiu alia siavice en ekflagro de sia malsana menso per giganta glav-bato

²⁴ Karolo Martelo, neleĝa filo de Pipino, komence kaptita en mallibereco de ties vidvino Plektrud, Franka Majordomo 714-741, populara kiel heroo ĉe la popolo pro lia venko super la Araboj ĉe Tours kaj Poitiers 732. Per vasta sekularigo de Ekleziaj posedaĵoj li grandigis sian forton, sed tamen li protektis Eklezian misiadon. Kiel „Princo de l' Frankoj“ li ne nur protektis al Willibrord, sed ankaŭ al ties posteulo Winfrid-Bonifaco, same kiel al episkopo Pirmin inter la Alemanoj.

²⁵ Hoŝea 2:1.

²⁶ Nun eks-insulo de Zelando, NL: Walĥeren.

trafis la kapon de l' Pastro de Kristo, por en sia terura blindiĝo venĝi, kion li konsideris maljustaĵo kontraŭ sia Idolo. Sed ĉar Dio ŝirmis sian serviston, pro la batego neniun vundon li suferis.

Sed ĉar tion vidis liaj kunuloj, ili alkuris por morte puni la aĉan senhonton de l' sendiulo. Sed la Viro de Dio noblamiene savis la atakiton el iliaj manoj kaj liberigis lin; sed jam la saman tagon iu Demono kaptis lin, kaj je la tria tago sian mizeran vivon li finis.

Kaj ĉar la Viro de Dio laŭ la Ordonoj de l' Sinjoro ne volis venĝi sin pri la maljusto, kiu lin trafis, des pli rapide la Sinjoro lin venĝis, laŭ la diro pri la maljusto, kiun malpiuloj ne timas havigi al sanktuloj:

„Al Mi apartenas ĉiu venĝo, Mi rekompencos“, diras la Sinjoro.“²⁷

Ĉapitro 15

Blasfemo punita

Kiam en alia momento la sankta viro vojaĝis al iu preĝejeto, kiu apartenis al lia dioceso kaj laŭ la nomo de l' preterfluanta akvo vojo „Suestra“²⁸ nomiĝis, por iom mallongigi la iradon li eniris en etan padon tra semkampo de iu riĉulo.

Kiam la kontrolisto de tiuj kampoj tion rimarkis, li ege koleriĝis kaj komencis blasfemi la Viron de Dio. Kiam ties akompanantoj provis senbruigi la blasfemanton, la Sklavo de Dio kun pacema animo kvietigis ilin, ĉar li, kiu ja celis la bonon por ĉiuj, certe ja ne volis, ke iu ajn pereu nur pro li. Kaj dum la animon de l' frenezanto neniamaniere li sukcesis kvietigi, li cedis al ties kolero kaj reiris laŭ la vojo, kiun li estis veninta.

Sed sekvatage la malfeliĉulo, kiu ne timis insulti la Serviston de Dio, forpasis je subita morto.

Ĉapitro 16

Kiel Moseo en la dezerto

Dum la Di-plenigita Viro, ĉar urĝis lin la Evangelio, ĉirkaŭiris tra la marbordaj regionoj, kie oni suferis je malsufiĉo da dolĉa akvo, li vidis, ke liaj kunbatalantoj pro la varmego tion apenaŭ plu eltenis; do tial unu el ili li vokis al si, al kiu li ordonis interne de lia tendo fosi etan kavaĵon, kie, kaŝe surgenuiĝante, li preĝis al Dio, kiu en la dezerto el ŝtono akvon elŝprucigis por sia popolo, ke Tiu nun en sama kompatato donu

²⁷ Readmono 12:19.

²⁸ Susteren en nuna Nederlanda Limburgo.

al siaj servistoj akvon el la sabla grundo²⁹.

Baldaŭ elaŭdiĝis lia peto kaj subite aperis fonto, kiu la fosaĵon plenigis per plej dolĉa akvo.

Kiam tion vidis liaj kunuloj, ili dankis la Ĉiopovan Dion, kiu gloris sian Sanktulon kaj trovis inda elaŭdi ties peton; kaj ili trinkis ĝis satiĝo³⁰, kaj por la sekvonta vojaĝo ili prizorgis ĉion necesan, kiom ŝajnis bezone.

Ĉapitro 17

„Ili trinkis ĝis satiĝo“

Kiam la sankta Pastro de Dio denove rondiris en iu loko, li vidis dek du almozulojn, kiuj de pasantoj petis almozojn.

Ĉar bonfarema li estis, ilin bonkore li alrigardis, kaj al unu li ordonis irpreni lian personan kruĉon kaj plenigi ĝin por la malriĉuloj de Kristo. El ĝi ĉiuj dek du ĝis satiĝo trinkis, kaj miramaniere kiam ili foriris, la kruĉo, el kiu trinkis tiom da homoj, montriĝis esti plena kiel antaŭe. Kiam tio diskoniĝis, ĉiuj laŭdis nian Sinjoron diranta:

„Vere efektiviĝis ĉe ni, kion en la Evangelio diras Dio Kristo: ‚Donu, kaj estos donite al vi.‘“³¹

Ĉapitro 18

Pri amaso da vino

La Sanktulo ankaŭ venis viziti sian Klostron. Post preĝado al Dio kaj salutoj al la Fratoj kaj pacigaj rimarkoj li rondiris la unuopajn loĝlokojn de la Fratoj, por vidi ĉu ie io estas plibonigenda; kaj volante kontroli ĉion, la pia Pastro eniris en vinkelon, kie li trafis etan kvanton da vino en unu barelo, kiun benocele per sia bastono li tuŝis, kaj foriris.

Sed tiunokte en tiu sama bareleto la vino komencis kreski kaj elŝutiĝi trans la randon de la ujo. Kiam tion rimarkis la kelestro³², mirigite de la neatendita abundo, li tion ne kuraĝis kaŝi, kion li komprenis okazi pro Dia kompato per la beno de Lia Servisto. Frumatene li kuris, surgenuiĝis antaŭ la Sankta Patro, kaj konfesis kion li vidis.

En kutima maniero li dankis Dion, kaj – tenante sin je la Ordono de la Sinjoro al

²⁹ Eliro 17:6.

³⁰ Benedikto – La Regulo 40:6. Same en ĉapitro 17 kaj 19.

³¹ Laŭ Luko 6:38.

³² Benedikto – La Regulo 31.

la lernantoj, nenion rakonti pri lia Aliformiĝo antaŭ la tago de lia Resurekto³³ – al la Kelestro li ordonis, antaŭ lia (de Willibrord) morto nenion rakonti pri la miraklo, kiun li spektis.

Ĉapitro 19

Pri simila miraklo

Ankaŭ alian similan miraklon Dio Kristo plenumis pere de Lia beno. Kiam la Sklavo de Dio kun siaj amikoj venis al domo de iu amiko sia kaj deziris iomete en la domo de tiu kara persono ripozi de l' laciga longa vojaĝo, li konstatis, ke la famili-patro ne havas iom da vino.

Kvar modestajn boteletojn, kiujn lia amikoj kunportis por survoja refreŝigo, li ordonis alporti kaj benis en la nomo de Tiu, kiu ĉe festeno geedziĝa akvon ŝanĝis en vinon³⁴.

Kaj miramaniere post tiu Beno ĉirkaŭ kvardek viroj el tiuj boteletoj trinkis ĝis satiĝo kaj tre dankeme ili gaje diris inter si: „Vere la Sinjoro Jesuo plenumis, kion en la Evangelio Li promesis: ‚Kiu fidas je mi, tiu faros la samajn farojn kiel mi; ja eĉ pli grandajn ol tiuj li faros’.³⁵“

Ĉapitro 20

Tantala turmento

La sankta predikanto je certa tempo kutima-maniere haste daŭrigis sian vojaĝon por la Evangelizado en Frislando, kaj pro laco sur la herbejo de iu riĉulo li volis ripozigi siajn ĉevalojn. Kiam tiu riĉulo vidis, ke siajn ĉevalojn li sur lia herbejo lasas paŝtiĝi, li komencis fierege forpeli ilin de sia paŝtejo. La Homo de Dio plej kviete alparolis lin:

„Frato, ne plu faru malbonon al ni! Ja ne por noci vian proprietaĵon, sed pro momenta senhelpo ĉi-hore en via herbejo ni volis ripozi. Urĝas nin disvastigi la laboron de Dio. Kaj de tio ankaŭ vi povos havi avantaĝon, se nin, kiom dependas de vi, vi bonvoleme akceptas, memore pri tiu plej dolĉa promeso de nia Sinjoro Jesuo Kristo: ‚Kiu vin akceptas, akceptas min, kaj kiu min akceptas, akceptas mian

³³ Laŭ Mateo 17:9.

³⁴ Laŭ Johano 2:7 k.s. Krom eksplicitaj analogioj al la Biblio, ankaŭ ĉi tie, kiel en la antaŭa ĉapitro, troveblas ia paraleligo kun Kristo mem.

³⁵ Laŭ Johano 14:12.

Sendinton.^{36'}

Sed se prefere pacamense kun ni vi volas fari vin mem amiko, do trinku iom kun ni kaj reiru, dum ni la komencitan vojon daŭrigos, kiel Di-benita homo en vian domon returne!“ Sed li obstinis en sia malbono kaj ne volis kvietiĝi pro la pacemaj diroj de la Homo de Dio, sed ripetis siajn insultojn kaj ĵetis ĉi ofendojn:

„Vi invitas min trinki kaj fari pacon kun vi, ĉu? Sciu do certege, ke por mi valoras neniom, trinki kun vi!“

Tiam la Homo de Dio el sia buŝo elĵetis ĉi diron: „Se vi ne volas trinki kun mi, do entute ne trinku!“ Kaj tuj kun la amikoj, kiuj jam estis preparitaj, sian vojon li plu iris. Ankaŭ la obstinulo hastis al sia domo, sed subite li tuta brulis pro soifo; deziris li refreŝigi sian ardantan stomakon per vino, sed la buŝo, kiu al la Homo de Dio ĵetis insultojn, ne sukcesis akcepti la trinkadon de vino, kaj kiu rifuzis fari pacon kun la Sklavo de Dio, devigite devis elteni la punon en sia korpo.

Vokitaj estis kuracistoj, por kvietigi la soifon, por redoni al la malsanulo la eblon trinki. Anhelis liaj visceroj, sed nenio helpis, kio povus enverŝi eĉ guton da vino en la brulantan gorĝon. Fine tamen pelite de rimorso li revenis en si mem: li rekonis ke estas la sankta Willibrord, kiun li ofendis, kaj kun stertoranta voĉo li petis, ke tiu revenu.

Kiam tiu sekvajare laŭ la sama vojo revenis, la malsanulo defore rekonis, ke li alvenas, kaj haste iris renkonti lin, konfesis sian kulpon kaj montrante, kiun punon li suferis, li petis pro amo al Kristo liberigi lin.

Pro kompato la Homo de Dio absolvis lin kaj donis al li, kun la beno, ke li trinku el lia kruĉo. Baldaŭ do liberigite li trinkis kaj sana li reiris al sia domo.

Ĉapitro 21

La nelacigebla Petro

En la urbo Treviro estas Klostro de Monaĥinoj, kiun en la epoko de la sankta Episkopo Willibrord trafis plej akra pesto. Pro ties kruelo multaj el la Servistinoj de Dio pereis, multaj en longa malsana doloro timis la morton.

Kaj ĉar apude al la menciita urbo estis la Klostro de l' Sanktulo de Eĥternaĥ, en kiu ankoraŭ hodiaŭ la korpo de ĉi tiu Sanktulo ripozas, kaj kiun liaj posteuloj en bone fundamentita tradicio respektas al la Patro kaj la Piaj Reĝoj daŭrigas, la Virinoj de la antaŭe menciita Klostro, kiam ili aŭdis, ke la Sankta Viro tien venas, tuj sendis delegacion por peti, ke li ne hezitu veni al ili.

Tiu, instruita per la neprofitema ekzemplo de la Princo de l' Apostoloj Petro, kiu pro la helpokrioj de la Vidvinoj de Kristo venis de Jafro al Lida por revoki la sanktan

³⁶ Laŭ Mateo 10:40.

Tabita al la vivo³⁷, tuj kaj senprokraste venis al ili, kiam li perceptis la peton de l' Virgulinoj de Kristo.

Kaj baldaŭ kiam en ĉi Klostron li venis, li celebris la meson por la malsanulinoj, benis la akvon, per kiu la konstruaĵojn li igis aspergi, kaj por trinkado prezentis al la malsanulinoj.

Kaj baldaŭ, ĉar tion donis la Dia kompatemo, ili resaniĝis, kaj poste neniu plu mortis en tiu Monaĥinejo pro la pesto.

Ĉapitro 22

Fajro Satana & Akvo Benata

Trafis iun famili-patron kaj ties domon Diablo-fantomo, tiel ke diskoniĝis tute sendube, pere de tiu teruro kaj ĉi sorĉado, ke en tiu domo loĝas iu malbona Spirito.

Foje ja manĝaĵojn, vestaĵojn aŭ aliajn kutimajn hejmajn objektojn ĝi kutimis rabi kaj meti en fajron, kaj eĉ infaneton, kiu ripozis en la brakoj de l' gepatroj dum ilia dormo, ĝi forprenis kaj ĵetis en fajron; sed pro la vekriado de l' etulo vekitaj la gepatroj tuj forprenis ĝin el la fajro.

Multajn kruelaĵojn tiu sama familio suferis de l' malbenita Spirito, sed neniu pastro povis forpeli ĝin, ĝis la Sankta Willibrord, laŭ peto de la famili-patro, Benatan Akvon al ili direktis, ordonante, ke la tutan meblaron de l' domo ili portu eksteren kaj priŝprucu ĝin per tiu akvo, spirite antaŭvidante, ke tiu tuta domo en flamoj konsumiĝos. Kiam tio estis efektivigita, la fajro tuj ek de la loko de la dormejo ekkaptis la domon kaj neniigis ĝin komplete.

Tuj kiam samaloko nova domo estis konstruita, sanktigita per benata akvo, depost tiam neniun eĉ plej etan signon de malbono ili devis suferi. Male neĝenate ili vivis kviete kaj en paco, ĉar Lia Servisto ilin liberigis.

Ĉapitro 23

Politika panegiro

Tiu ĉi Di-amata Viro antaŭdiris kelkajn aferojn en profeta spirito, kiujn la rezulto poste montris veraj.

Li baptis Pipinon, filon de l' plej forta Duko de l' Frankoj Karolo, patron de la nuna plej nobla Karolo, kiu kun plej grandaj triumfoj kaj ĉia indeco regis la plej gloran Regnon de l' Frankoj.

Pri tiu Pipino, lia patro, ĉi Sanktulo kun profeta voĉo antaŭ siaj lernantoj eldiris ĉi

³⁷ Agoj 9:36-43. ‚Senprokraste venu al ni‘ ĉi tie fariĝis: ‚Senprokraste venis ...‘

antaŭdiron:

„Sciu, ke tiu infano estos tre granda kaj glorplena kaj pli granda ol la Dukoj de ĉiuj antaŭaj Frankoj!“

La vero de tiu antaŭdiro pruviĝis en nia tempo, kaj ne necesas serĉi atestojn pri tio, kion la aŭtoritato de l' tuta regno garantias. Ĉar la tuta popolo scias, per kiuj triumfoj la plej nobla venkinto estas festata, aŭ kiom la limojn de nia Imperio li plilarĝigis, aŭ kiel devote la Kristanan religion li vastigis, aŭ kion pro defendo de la Sankta Eklezio de Dio ĉe fremdaj landoj li faris.

Ĉion ĉi pli bone per la okuloj eblas vidi ol klarigi per vortoj.

Ĉapitro 24

La vivstilo de Willibrord

La Sanktulo estis eminenta je indeco, majesta aspekte, vizaĝe honorinda, gajkora, saĝa en konsiloj, voĉe agrabla, karaktere firma, forta en ĉiu agado por Dio.

Sed kian energion li havis, fariĝas ja klare el liaj antaŭe menciitaj agoj; kaj kian diligenton li montris ĉe la predikado de l' Evangelio de Kristo, ne devas esti pentrita per nia plumo.

Lia kaŝa obstino en viglado kaj preĝado, en fastado kaj psalmkantado estas komprenebla same el la sankteco de lia vivo kiel el liaj mirakloj. Lia amo ja montriĝas en la daŭra sindediĉo, kiun ĉiutage pro la Nomo de Kristo li prenis sur si.

Sed ĉi tiu Sankta Viro, kiu ĉiutage progresis en la Dia laboro, estis amata de Dio kaj sin montris pardonema al la tuta popolo, kaj en la tagoj de la pli aĝa Karolo, la brava Franko-duko, kiel maljunulo kaj plena de ĉiu pleneco de tagoj li estis ‚lokita ĉe siaj patroj‘, por ricevi de Dio la riĉan frukton de sia laboro, forlasante ĉi teron, por ricevi la Ĉielon, por seninterrompe en eterna gloro spekti Kriston, en kies amo, dum ĉe ni li vivis, li ne ĉesis labori.

La sesan de novembro, t.e. la okan tagon antaŭ la Iduoj³⁸, li foriris el ĉi tera migrado al la Eterna Patrujo, kaj li estis entombigita en la Monaĥejo Eŝternaĥ, kiun li mem konstruis por Dio, kiel ni jam diris. Tie ĝis hodiaŭ, dank' al la Dia Pardonemo, la mirakloj kaj saniĝoj ĉe la relikvoj de ĉi Sankta Pastro de Dio ne ĉesas okazi.

Ni do kredas, ke estas inde, por la gloro kaj honoro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu per la relikvoj de sia servisto bonvolis realigi ĉi tion, aldoni tion ĉi al tiu ĉi nia historio pri li.

³⁸ Laŭ praa Romia datindiko.

Ĉapitro 25

Miraklo ĉe entombigo

La honorinda korpo estis entombigita en marmora sarkofago, kiu unue montriĝis je duona piedo tro malgranda por la tuta korpo de l' Sklavo de Dio. Kiam la fratoj pri tio estis ege tristaj kaj ne sciis, kiel agi, kaj ili forte interdiskutadis, kie trovi ĉerkon taŭgan por la sanktula korpo, subite montriĝis, ke la sarkofago por la Sankta Viro miraklamaniere same plilongiĝis, kiom antaŭe ĝi estis tro mallonga³⁹.

Kaj en ĝi kun himnoj, psalmokatado kaj ĉiu honoro la korpon de l' Homo de Dio ili entombigis en la Preĝejo de l' menciita monaĥejo, kiun li mem kiel ĉefpastro por la Sankta Triunuo konstruigis kaj dediĉis.

Sed ankaŭ flagra aero de mira odoro trafis la nazojn de ĉiuj ĉeestantoj, tiel ke unuanime oni devis konstati, ke alvenis helpo de Anĝeloj por la entombigo de l' Sanktulo.

Ĉapitro 26

Anĝela servado

Sed ankaŭ al tre pia lernanto de l' Sanktulo, kiu troviĝis je granda distanco, kiu vigilis dum preĝado, lia forpaso estis sciigita.

Li ja atestis, ke la animo de l' Sankta Patro kun granda luma brilado, dum harmonia kantado de Anĝelaj Armeoj estis portita al la Ĉiela Regno. Ankaŭ multaj el la Fratuloj atestis, ke super la mortolito, sur kiu li al sia Kreinto redonis sian Sanktan Animon, ili perceptis mirindan lumon kaj eksentis flagradon de mirinda odoro, tiel ke pro ĉi indicoj oni ĝenerale kredis, ke tiu loko, kie lia animo foriris al la Sinjoro, estis vizitata de Ĉieluloj.

Ĉapitro 27

Disrompitaj ĉenoj

Per la ŝmirado de oleo, kiu kutimis brili super la korpo de l' Sanktulo, dank' al Dio kun helpa subteno de ilia fido, multaj malsanuloj estis kuracitaj.

Tre ofte saviĝis ankaŭ tiaj homoj, kiuj pentofaris en la sama preĝejo, laŭ praa kutimo ĉirkaŭitaj de feraj katenoj: Subite tiuj ringoj rompiĝis kaj iliaj katenoj defalis. Atestas pri tiu miraklo la ĝis hodiaŭ tiupreĝeje pendantaj ringoj.

³⁹ Temas pri la ŝtona sarkofago de 1.89 m ĉe 0,46 m.

Ĉapitro 28

Paralizita virino

Sed unu paralizita virino, kiu sep jarojn suferis pro grandaj doloroj, ĉe kio de tag' al tago ŝia paralizo tiel kreskis, ke ŝi, ĉar ŝiaj membroj rifuzis ĉiun servon, plene dependis de ekstera helpo; nur bruste stertorante en elĉerpiteco apenaŭ spiradi ŝi povis.

De siaj proksimuloj ŝi estis portata al la preĝejo, kie ripozis la Sanktulo de Dio, kaj apud liaj relikvoj oni ŝin metis; tiuloke larmoverŝite ŝi preĝis, ke la Dia mizerikordo kun helpo de l' sanktulo kompatu ŝin.

Elaŭdite de Dio kaj tuj savite de sia malforto, la feliĉulino, kiun antaŭe portis aliuloj, iris proprapiede hejmen sub ĝoja dankodiro.

Ĉapitro 29

Junulo malsana

Same junulo malsana, kiu ĉiumembre skuiĝis, estis per la manoj de siaj amikoj portita al la korpo de l' Sankta Pastro; eĉ la kapon li ne povis levi, sed se ĝi tiel dire ne estus fiksita al lia kolo, ĝi ĉiuflanken ruliĝus: ĉar kelkfoje li tiel senkonsciiĝis, ke li impresis kiel mortinto.

Tiu, kiel dirite, estis metita ĉe la kadavro de l' Sanktulo; sed per kompato de Dio, dum ĉiuj ĉeestantoj ĝin vidis, li tiel subite resaniĝis, ke en li neniu simptomo restis de l' antaŭa malsano aŭ sufero.

Ĉapitro 30

La sakrilegio

Diakono, kiu ne decidis je sia ofic o, ne timis per malfeliĉa rabo forpreni el la preĝejo de l' Sanktulo oran krucon, kiun la Sanktulo kutimis kun si kunporti dumvojaĝe.

La Fratoj perturbiĝis pro tiu rabo, kaj ne sciis, kiu kulpas pri tiu malpia krimo, sed en preĝoj ili konfidis je la Sanktulo de Dio, ke tiu tiel fia krimo ne povas resti kaŝita, kaj per frata amo ili esperis povi revoki la homon al pentemo, en la espero ne pereigi lin; sed tiu, kiu kulpis la krimon, durakore malŝatis sian saviĝon, kiel diras Salomono: „Kiam venas malvirtulo, venas ankaŭ malestimo kun honto kaj moko“⁴⁰.

La malfeliĉulo kredis povi resti kaŝita, ĉar li sciis, ke li faris ĝin for de la okuloj de

⁴⁰ Sentencoj 18:3.

l' ceteraj; sed al la okulo de Dio, por kiu ĉio estas klara, li ne povis eskapi, ĉar tiu neniam tardas puni la maljustaĵojn de l' siaj⁴¹.

Ĉar tiu mizerulo, kiu ne timis plenumi tiun krimon, per mizera subita morto forkaptite pereis, kaj ĝuste ĉe tiu fino de l' vivo al kelkaj el la Fratoj li sin montris kulpa, kaj konfesis sian kulpon pri la krimo, kaj samtempe al ili malkaŝis, kie la rabitaĵon li kaŝis.

Tiel, ho Fratoj, vi vidas, per kiu terura juĝo tiu estas kondamnita, kiu ne timis per ŝtelo profani la Eklezion de l' Sankta Dio.

Tial mi do petas vin, ke en ĉi domo vi gardu ĉastan vivstilon, por ke la Dia Kompatemo vin opiniu inda, ke per la porpetoj de l' Sankta Apostolo Klemento vi estu elaŭditaj, kiel antaŭe ni jam diris, ke tiu elaŭskultas la preĝojn de l' malfortuloj en tiu ĉi preĝejo: Kun la longe sopirita saniĝo li lasis ilin hejmeniri.

Tiel do ne estas ia ajn dubo, ke – kiel li kompatis por en videbla maniero sanigi iliajn korpajn difektojn – li ankaŭ ne hezitas, la kaŝitajn malsanojn de niaj animoj pro interveno por ni de sia Sanktulo, kiu ĉi tie korpe ripozas kaj pri kies spirita ĉeesto ni kredas, ĉiutage ne ĉesas elaŭskulti se kun forta fido kaj sincera konfeso ni plorante elverŝas niajn korojn ĉi tie antaŭ la aspekto de lia pieco; en sia Dia Graco Li pretas pardonon, se ni ne tro malviglas ĝin peti.

Ties laŭdo kaj gloro en eternon!

Ĉapitro 31

Patro kiu imitas la filon

Restas ankoraŭ reveni al la sankta Wilgis, kiu kiel dirite estis la patro de ĉi Sankta Viro, por, ĉe kies historio komenciĝas la unua ĉapitro, pri li traktu ankaŭ la lasta.

Revenis do la jara tago de l' sankta pilgrimado de tiu sama sankta Wilgis, ĉe kiu la pia Abato Aldbert, la posteulo de l' honorinda Ĉefepiskopo, post la religiaj ceremonioj kaj la al Dio ŝuldita honorado komencis kun la Fratoj festmanĝadi. Sed en ĉi klostro neniom oni trovis da vino krom du kruĉoj, el kiuj unu ja matenmanĝe estis malplenigita, la alia flankenmetita por la vespermanĝo.

Tial la Fratoj post la vespera laŭdokanto⁴² por danki pri tiu tago reiris al la refektorio, kie post la sanktaj legaĵoj la menciita Abato al la Fratoj direktis jenajn

⁴¹ Al la Hebreoj 4:13: Neniu kreaĵo restas kaŝita por ĝi, sed ĉio estas nuda kaj malkovrita antaŭ la okuloj de Li, antaŭ kiu ni donu klarigon.

⁴² Regulo de Benedikto 17:7. La Vespro enhavas kvar psalmojn kun antifonoj.

vortojn⁴³:

„Estas tre inde, honorplenaj Patroj, ke ni festu en ĝojo de l' Spirito niajn honorindajn Antaŭulojn kaj, forirante de l' kutimo ĉiutaga, en senstreĉa etoso cedas al homaj bezonoj – ne en la spirito de drinkado, sed en amo. Neniel sekreton mi farus el tio, se inter ĉi muroj eĉ nur unu Kruĉon mi havus, kiu restis el la matenmanĝo.

Sed nia Dio ja estas pova, per la preĝoj de siaj Sanktuloj tiun ĉi nuran plenigi por ni superflua, por doni al ili honoron kaj al ni ĝojon.

Do lasu nin kun dankemo kaj konfido ĝui la malmulton, kiun ni havas!“

Post kiam unu- kaj du-foje la Fratoj trinkis el la sama kruĉo, la servisto trovis ĝin same plena kiel antaŭe. Kiam tion la Abato aŭdis, li ne ĉesis, kune kun la Fratoj, dankodiri al Dio, kaj tiunokte gajakore kaj mezure ili trinkis, kiom ili deziris, kaj ne sen dankodiro al la Ĉiela Kompatemo.

Ho Patro feliĉa, kiu naskigis tian Filon kaj kion Dio trovis inda por tia posteulo! En li plenumiĝas jena profetaĵo, kiun eblas legi en Readmono:

„Benita vi estos & benita la frukto de via ventro“⁴⁴.

⁴³ Regulo de Benedikto 38:10. La leganta frato de la semajno ricevu iom da miksitaj vino, antaŭ ol komenci, pro la sankta komunio kaj por eviti, ke fariĝu al li pezo elteni la fastadon.

⁴⁴ Readmono 28:3-4.

Ĉapitro 1 Willibrord: „Stelo plej luma“

La Farinto kaj Kreinto de l' Universo, same kiel el la Ĥaoso de l' senorde disĵetita materio ĉion Li ŝanĝis en Ordon kaj – Mem Plej-bela – la tutan mondon provizante per nekomparebla beleco por prilumi kaj ornami la mallumon de la nokto ankaŭ starigis la stelojn por, irante kaj revenante, formi la aspekton de l' ĉielo, tielsame Li por klarigi kaj ornami la internan kaj eksteran nokton de l' mikrokosmo, same antaŭ la leĝo kiel sub la leĝo kaj sub la graco tempe de l' matena apero de l' vera Lucifero, kiu la veron kaj la eternon frumatene en brilo heroldas, – tiu prezentis virojn de plej alta virto kvazaŭ ĉielkorpojn kun supera rebrilo al sia epoko, en daŭra interŝanĝo kun la malhelo de la pekoj por disverŝi la brilon de l' Suno de Justeco super la tut-homara blindeco⁴⁵.

Inter tiuj – kvazaŭ inter la Matensteloj, kiuj samtempe laŭdas kaj gloras Dion, ĉiuj Filoj de Dio jubilas – ĉe la Britanoj kiuj plene estas forbaritaj de l' kontinento, en la provinco Northumbrio aperis kvazaŭ brila stelo ĉi tiu de Kristo amata Willibrord, kiu per la radioj de sia virto ne nur la mondon Britanan, sed la tutan, kvarone dividitan Ekumenon prilumis. Elŝprucis kaj ekkreskis li kiel Filo de l' Eterna Lumo por la Sorto de la sanktuloj en klara brilo, jam antaŭ sia naskiĝo konata de la mondo pere de mistera vizio.

Ĉar kiam lia mirinda patrino, kiu derivis sian familion de fama sango de pluraj prauloj kaj elektis sian edzon, kiu nomiĝis Vilgis, devenan el plej nobla Saksa nobelaro, nur por generi posteulon kaj pro pura amo, ne el seksaj motivoj, elstreĉis siajn membrojn lacigitajn per la taga laboro por refreŝiga dormado, ŝi estis trovita inda, en nokta vizio dum la tempo, kiam profunda dormo la homojn ekkaptas, por esti prilumita per la gloro de Dia brilo – kvazaŭ profetaĵo pri ŝia estonta Ido. Al la okuloj de ŝia spirito ja aperis pro Dia Revelacio iu Luno, tia kia ĝi estas, kiam la revenantajn briladojn ĝi kunigas kaj la lunlumon ree novigas: en la stadio de l' Plenlumo plenigita

⁴⁵ La frazkonstruo klare superis la forton de l' aŭtoro.

de ĉiuj flamoj de l' Suno, senhalte – ŝajnis al ŝi – ĝi de la zodiako iom post iom subiĝis en la buŝon kaj la intestojn de la dormanto.

De la brilo de l' interna fajro ŝia interno lumiĝis kaj ŝi estis kaptita de nemezureblaj tremetoj kaj skuiĝoj pro tiu de memoreblaj tagoj nekonata vizio, timplena kaj sen espero. Ŝia koro fajre ekflamis, kaj dum tiu flamo lekis ĉirkaŭ ŝia pura koro, el la dormo ŝi time vekigis kaj de sia lito ekstaris. Dum ĉion ĉi ŝi pripensis, la fajro ekflagris, kaj jen tien jen ĉi tien siajn zorgojn ŝi turnis, iun pastron ŝi trovis, viron de pleja pieco, kaj siajn viziojn malkaŝante ŝi demandis lin, kiujn misterajn sencojn konigas tiu vizio. Sed kiam pliintime ŝi estis demandita, ĉu tiunokte ŝi estis kuŝinta en la ĉirkaŭbrako de la edzo, ŝi ne serĉis elturniĝojn, kvankam ŝia vizaĝo fariĝis treege ruĝa, kaj per la buŝo de l' esploranto, tiu ilo de l' Sankta Spirito, ŝi ricevis jenan antaŭdiron pri sia jam antaŭ la naskiĝo fama infano:

„La Lunkuglo, kiu per la kreskado de l' luno en vian visceron ŝajnis enfali, estas via brila filo, kiun tiel gracoplene vi akceptis, kaj kiun en ankoraŭ pli granda feliĉo vi naskos kaj nutros. Per la brila gloro de sia klareco li verŝos lumon sur la animojn de l' karne orientitoj, kiuj en mallumo de l' nuna morto forŝimiĝas kaj tute malhavas la internan lumon. Per la brilo de sia mirinda agado kvazaŭ la suno, kiam ĉe zenito siajn radiojn ĝi elsendas, per tiu lumo de sia laŭdinda famo, kvazaŭ per la luno, en ĉi nokta obskuriĝo de l' tera ekzisto li havos brilan nomon kaj al tiuj, kiuj tempe de l' obskuro devas iri, la vojon de l' justeco li montros. Per la brilaj radioj de sia famo li loge invitos al atento kaj jesado de l' pado de la virto, kaj same kiel la larĝe radianta suno, per kiu la animo de l' justulo kiel saĝec-centro, kaj same kiel la luno, per kiu la perfekteco de l' spirita-fizika organismo videble aperas, li antaŭeniros en perfekta eterneco antaŭ la vizaĝo de l' Dia Gloro kiel netaksebla valoro de sia merito.

Sur la loko, kiu indas al li, li staros kaj li pli klare brilos ol la misteroplenaj steloj de l' firmamento. Ĉar inter la plej eminentaj filoj de l' eklezio, kiu samkiel la luno en la ĉi-monda epoko kreskas kaj malkreskas, lin la vera lumo, la lumo de l' homoj same kiel la brilo de l' Dia Honoro, samkiel la brilo de l' eterna lumo prilumas per sepobla radiado.“

Ĉapitro 6

Honoro pezas

Sed kiam al Willibrord estis klare, ke en limlanda militado la Frisoj, popolo obstina kaj nedresebla, estas submetitaj, por substreki ĉi tiun bonvenan situacion li decidis iri al Pipin, filo de Ansgis, la duko de l' Frankoj, kiu devenis de l' mirinda

pastro Arnolf de la tribo de l' Mediomatrikoj⁴⁶, filo de la mirinda Begga, fratino de l' ĉarma junulino Gertrud⁴⁷, kiu en laŭleĝa heredado kiel dommastro sub la eminenta reĝo Dagobert kiel plej sukcesa venkinto de la Frankoj la reĝlandon brile regis, pligrandigis kaj kondukis al gloro kaj respekto.

Kaj kiam li, la semojn de la vivo kunigante, atingis la plej altan punkton de sia leviĝo, tiam li estis akceptita de li kun la plej honoraj vortoj kiel Ŝebaot, la kunulo kaj la anĝelo de l' Sinjoro, kaj ĉar li disponis pri sagaca energio kaj plena kvanto da lerto, humile li petis, ke li permesu al li, ke li range altiĝu per la honoro de l' pastrigo, kaj ke lin konsekru la tre sankta Papo Sergio, ĉe kio li humile aldonis, ke por juna ĵusplantita branĉo tio estas utila, kaj tiel des pli riĉe pluvon li povos akiri por la heredaĵo de l' Sinjoro.

La fama Estro ĉiumaniere insistis; sed Willibrord, kvankam kutime ema kunlabori, klera kaj tre memkonscia, malfacile kontraŭstarebla, silente pripensis, ke la unika kaj sola Filo de l' Patro, la Reĝo de ĉiuj Reĝoj, kaŝe forŝteliĝis por ke la popolo, kiu je li fidis, ne deklaru lin reĝo⁴⁸. Kaj en sia komentario al la Timeo de Platono Kalcidio senchave daŭrigas: „Laŭnature ĉiu homo estas ambicia; la honoro efektive ja estas nura montrilo de l' interna forto“.

Tamen li ne strebis al la honoro por konservi mir-maniere tiun humilecon, sed prefere li klopodis por la portado de l' peza ŝarĝo de tiu distingo; porti tiun ŝarĝon sur la ŝultroj ja povas nur tiu, kiu disponas pri amaso da kapabloj, kiujn la mirinda misiisto de l' gojoj postulis kiel precipajn kaj nemalhaveblajn kriteriojn por jam elektita episkopo⁴⁹. Kaj kvazaŭ li mem ne estus benata de tiu Dia dono, timtreme li petis, ke oni forpelu de li tiun deziron kaj konsideru iun alian, kiu estus pli inda ol li prizorgi la Domon de Dio, por elekti kaj instali tiun⁵⁰.

Domon, patrujon kaj familion li forlasis pro ĉi lando kaj la vera promeso, laŭ la ekzemplo de la ĉefa patriarĥo Abraham, kaj ne decis nek kongruis kun la firmeco kaj matureco de sia persono, kiam la ĉi-teran gloron, kiun foje li malŝatis, por akiri la ĉielan gloron, li nun volus ree repostuli.

Sed kiel diras la plej grava biblio-ekzegezisto, Hieronimo⁵¹, pri la mortinta Nepotiano: ju pli oni kontraŭas, des pli fortiĝas la instigado de ĉiuj pri lia persono, kaj

⁴⁶ Popolo menciita de Cezaro en lia *Pri la Gaŭla Milito*.

⁴⁷ Teksto ne klara.

⁴⁸ Johano 6:15.

⁴⁹ 1 Timoteo 1:3.

⁵⁰ Frazo tre komplika ne tute klara.

⁵¹ Hieronimo – Letero 60,10.

per sia kontraŭanta sinteno li akiris siajn nekutimajn meritojn, kaj li iĝis des pli inda, ju pli forte tiun indecon li kontraŭdiris. Unuflanke venkita de Diaj pripensoj, aliflanke ne malpli de la obstina retoriko de tiuj, kiuj kontraŭdiris, fine li memoris la diron el la libro Samuel⁵²: „Obeado estas pli bona ol buĉofero, atendado estas pli bona ol la sebo de ŝafoj; kaj neplenumo estas kiel peko de idolservado“.

Al la volo de ĉiuj li submetis sian propran volon dank' al tiu, kiu diris: „Mi ne venis por fari mian propran deziron, sed la volon de tiu, kiu min sendis⁵³“. Li donis sian konsenton al tio, kion interne li malakceptis, kaj post kiam de la eminenta Duko li ricevis akompanon kaj donacojn, kiuj indis por la Sankta Seĝo, li ekiris la vojaĝon al Romo, urbo, kiu ĉe la Grekoj estas konata kiel forta, ĉe la Judoj nomiĝas sublima.

Ĉapitro 9

Eklezia reformo: Monaĥeja aŭtonomeco

Kaj por mallonge tuŝi lian vere monaĥejan vivstilon: de infanaĝo vere li sentis sin monaĥo; kaj tial de la monaĥeja stato, kiun preskaŭ infanaĝe li jam akceptis, kiun kun tiom da ŝvitado tiel longe li portis, kaj kiun neniakaŭze pro la sin prezentanta Pastra tasko li volis rezigni aŭ nur ŝanĝi, tial li ordonis, ke ĉiu fratara komunumo, kiu en la domo de Dio unuece kunvivis kun li, sekvu la mallarĝan padon de monaĥeja askezo, ĉar lia doktrino neniel diferencis de lia vivstilo; de tiam ĝis la fekaĵo de nia nuntempa malĝoja ekzisto neniu komunumo da klerikoj en Gaŭlujo pli alproksimiĝis al la idealo de l' monaĥeja vivado ol tiu sanktigita kongregacio de Utreĥt, de neniu la ritoj estis sekvataj pli ekzakte kaj konscience.

Besto plumhava, besto sankta, antaŭe kaj malantaŭe plena je okuloj⁵⁴, resumas kaj bildigas, kiom da specifaj ecoj formas la forton de l' Pastro, al kies spirita privilegio apartenas la inspiro kaj la brako por efektiviĝi la benportajn oferojn, nome: La vera kora Pureco kaj la Scio pri la Volo de Dio, la Vero de l' Instruo kaj ia Forta Mano kontraŭ la Armeoj de l' Aero, la forta Kuraĝo; kiu ne povas tuj transiri de belaj sonoj, glimaj koloroj kaj de plej diversaj gemoj al la plej sankta, ne meritas porti la titolon Pastro, ĉar lia klopodado nur celas, ke lia irado kaj venado kaj tuta lia aktiveco fariĝu laŭte aŭdebla, ke liaj faroj kaj diroj direktiĝu al instruado de l' Homa Gento.

⁵² 1 Samuel 15:22.

⁵³ Johano 6:38.

⁵⁴ Apokalipso 4:6.

Kun mirinda persisto li substrekis, ke la Pastro devas esti sen riproĉo⁵⁵, ĉiam celanta la sanktan kaj neniam forlasi ĝin, por ne profani la sanktecon de sia Dio, sed daŭre preta, kiel servanto de Dio kaj homoj prezenti al la popolo la oferojn por la popolo, kaj ĉar la sankta oleo de Kristo estas sur li, per buŝo benata prepari la karnon de la ŝafido.

Kiel esploristo por la domo de Izrael li supreniras sur la pinton de Libano, kie la nazo de l' Novedzino unuiĝas kun la voĉo de l' Novedzo⁵⁶, kaj li, strarante sur la alto de l' sankta renkontiĝo kaj sekura ĉe l' vasta panoramo kaj la ŝirmateco, same distingante per la nazo la fiodoron de l' malvirtoj dis de la odoroj de l' virtoj kaj lernante de-fore antaŭvidi la atakojn de kontraŭbatalantaj spiritoj kaj per la ricevita Dia graco la al li konfiditajn animojn li povis defendi.

Ĉapitro 11

Vanitas vanitatum!

Fine la pagana estro⁵⁷ invitis la miraklan Pastron al sia palaco, por plia informo pri lia malestimo pri sia Dio kaj sia ordono.

Sed tiun tute ne timigis lia senbremsa kolereksplodo, sed tute ne okupiĝante pri ĉiu tiu kolero kaj ekscitiĝo, ĉe ĉiu insulto de la furiozulo li retenis senskuan vizaĝesprimon, kiun donas la saĝo kaj kiun atingi por la stulteco ne eblas, kaj fine ekdiris:

„En viaj Falsaj Dioj enestas neniu eĉ plej eta sparko da Dia forto, pri kies malestimo vi min provokas, sed nur pura vaneco senenhava, kiu nur celas erarigi la animojn de nekredantoj por konduki ilin en pereon. Nenio estas ĉiu idolo-bildo, nenio estas el ŝtono hakita idolo, kiun formis homa fantazio kaj miskredo por la daŭra malsanigo de koro kaj korpo. Ne ekzistas alia Dio ol Tiu, kiu kreis la rondan kaj daŭran rondiradon de la ĉielo, kiu al la daŭra reveno de la nestabilaj planedoj donis ilian fiksitajn pozicion same kiel la bordojn al la maro, ĉar nur Li konas la limojn de sekec-periodoj kaj pluvsezonoj, Li, kiu regas la Mondon per sia eterna Leĝo. Ĉe sia plano, la mondon forkonduki el la peko, preterirante la pekojn, li naskiĝis el virgulino, kaj ĝuste per sia morto li detruis la potencon de la morto kaj liberigis la homan genton, kiu pro la neriparebla damaĝo de la pekofalo estis transdonita al pereon.

⁵⁵ Tito 1:7.

⁵⁶ Alta Kanto.

⁵⁷ Radbod.

Li estas la sola, li estas la Plejbona, ĉiu ĵaluzo estas forpelita de la Plejbona; tial la deziro pri la plejbono estas la decidiga kaŭzo de ĉiu kreaĵo.

Tial do prave antaŭ ĝi en deca respekto fleksas la genuojn la tuta kreitaro⁵⁸ de videblaj kaj nevideblaj estaĵoj. Ankaŭ vi, Eminentaj Reĝoj, fleksu do antaŭ la Reĝoj de l' Reĝoj kaj la Sinjoroj de l' Sinjoroj vian nukon, demetu kaj forĵetu de vi ĉiun obstinon. Kiel lia humila kaj senvalora servisto mi certigas vin je lia apero kaj ĉiela potenco, ke vi, kiam per mia buŝo Tiun vi aŭdas per orelo aŭskultanta, kiu al vi parolas en mi, kaj kiam vi post la bapto en la akvo de savo hontoplene funebras kaj pentofaras pri viaj stultaj erarvoj, savite en eterna vivo, kronite de la Krono de nedirebla kaj neimagebla gloro vi spektos inter la reĝoj de l' ĉiela konsilio la Reĝon Eternan en lia gloro longe for de ĉia ĉi-tera limiteco.

Sed se miajn admonojn, kiujn kiel lia reprezentanto al vi nun mi prezentas, vi ne honoras kaj vin do ne purigas de idoladorado, tiam sen iu ajn hezito vi estu certa, ke vi estos deĵetita de via trono de via gloro kaj metita en la plej profundan abismon de Tartaro kaj longe for de l' zorgoplena komparto ĉe tiuj, kiuj estas ĉirkaŭpelataj en la pleja profundo, nedireblan kaj senfinan doloron vi suferos kune kun la trompobildo, kiun nun vi adoras kiel Dion.

Kaj kiam ĉe tio konsekvence kaj necedante li restis, la Estro rekonis, ke pelite de flama deziro pri la krono de l' mirtiriĝo li serĉas la punon kaj timas senpunecon; kun interna kvieto tial li respondis: „Vivu, eĉ se senvole; mi konstatis ke la morton vi konsideras kiel senpeziĝon el sufero, ne kiel ĉagrenon⁵⁹. Viaj agoj similas viajn dirojn; fieraj kaj kuraĝaj“⁶⁰. Kiel grandioza, se eĉ pagana, estas la princo, kiu gardis la justecon, kvazaŭ ekzemplo inter la paganoj super la koruptitaj moroj de l' gvidantoj de la ortodoksa fido, kiu proponis ekzemplon imitindan.

La homoj kiuj pli atentis siajn emociojn ol sian famon, misuzas kondamnojn kaj antaŭjuĝojn; sed iu alia dum tri tagoj, por ne kondamni senkulpulon al nejusta mortpuno, ne nur petis la opiniojn de siaj pliaĝuloj kaj pastroj, sed ankaŭ aplikis tre malnovan metodon de orakol-konsultado, per kiu tiuepoke, kvazaŭ per Dia revelacio, estis malkaŝitaj kaj ekkonataj informoj pri profundaj kaj sekretaj aferoj.

Ĉe tio li ne volis sin lasi surprizi de kiu ajn, kiel leĝojn li rompas, kiujn mem li institutigis kaj, kiel unua el sia popolo, imitante la ekzemplon de la Sparta leĝdonanto Likurgo, kiu anstataŭis sian fraton, la Spartan reĝon Polidekton, leĝojn li inventis kaj

⁵⁸ Filipianoj 2:10.

⁵⁹ Salustio – Konspiro de Katilino 51:20: „meze de malĝojo kaj mizero la morto estas malpeziĝo el plagoj“.

⁶⁰ Cito el Lukano 2:511.

fiksis por la Frisa popolo. Kaj tiu tiel grava defendanto de ŝtata disciplino, kiom oni povas kredi la tradicion de l' prapatroj, kiam per la teologia predikado de l' apostola viro li estis kondukita ne nur al la fundamentoj de la katolika religio, sed eĉ al la akvo de la bapto.

Sed kiam sian piedon li trempis en la akvon, interne kaj eksterne samgrade necerta kaj dubanta – eble ĉar, kiel atestas la stile mirinda aŭtoro Salustio, la volo de reĝoj estas kutime same impulsa, ŝanĝiĝanta kiel nefidinda –, fariĝinta apostato, en granda rapido ĝin retiris de tie ...

Ĉapitro 22

La genealogio de imperiestroj

Pelite de tiel grandaj kaj tiom da kapabloj, fama kaj glora ĉe la popolo, la Estro Karolo, venkanto en Aŭtrazio⁶¹, filo de l' jam menciita Pipino, per plej humilaj petoj demandis, ke lian filon Pipinon per la viviga fonto de l' bapto li purigu de la malpuro de l' origina peko. Kaj kiam al ĉi inda kaj pia deziro tiu konsentis kaj la sakramenton de la renaskiĝo li celebris, li deklaris, priŝprucite de la roso de la konsolanta Sankta Spirito, per profeta buŝo la grandegan gloron de lia posteularo:

„Tiu ĉi infano, kiu hodiaŭ renaskiĝis en Kristo, per la graco de la nelimigita Spirito atingos la plej altan gloron kaj honoron, siajn praulojn larĝe superos, estos pli glora ol ĉiuj Duko de la Frankoj, kiuj en antaŭaj generacioj staris je alta rango!“

Neniu profetaĵo de Jesaja iam estis eldirita kun pli granda certeco, kiel unuflanke per aŭtentaj atestoj de histori-libroj kaj de skribitaj raportaĵoj, kiuj laŭvere staras super ĉiu dubo, aliflanke nepridubeble povas esti pruvita. Ĉar li, heredanto de la nomo de l' avo, samkiel de la indeco kaj forto de l' patro kaj pro la mortigo de nekalkuleblaj malamikoj „martelo“⁶² nomata, kiel unua el tiu tiom granda familio, pro lia mirinda kapablo militista, liaj strategiaj kapabloj kaj grandiozaj retorikaj talentoj, dank' al la legitimiga aŭtoritato de Papo Zaĥarias⁶³; antaŭe estis detronigita la reĝo de l' Frankoj Hilderiĥ, ĉar tiu kolapsis en senlima stuporo kaj komplete ne plu taŭgis por regado, anstataŭe li ricevis monaĥajn diademon kaj vestaĵon; do Pipino estis elektita, sanktoleita kaj reĝigita en 750.

⁶¹ Ĉampanjo, Mozel- kaj Mozo-regiono kun ĉefurbo Remso.

⁶² Eraro de l' aŭtoro: Ne Pipino sed ties patro Karolo kromnomiĝis Martelo pro lia venko kontraŭ la Araboj ĉe Tours kaj Poitiers en 732.

⁶³ Papo 741-752.

Lia animo, laŭ la esprimo de la sankta Sinjorino, ke David estas elektito laŭ la koro de Dio, estas gardita kvazaŭ en areto de animoj, kiuj vivas apud la Sinjoro, dum aliflanke la animoj de liaj malamikoj estis neniigitaj kvazaŭ per rondiranta forto de ĵetilo.

Kaj kiom gravus por mi ripeti, kion aliaj jam pli koncize kaj en pli klaraj vortoj rakontis: Kun kiom da fizika supereco, kun kiel suverena karakter-forto li venkis la Langobardan reĝon Ajstulf⁶⁴ kiun – enŝlositan en Pavia – li devigis doni 40 garantiulojn; pere de ĵuro li devigis lin redoni la posedaĵojn, kiujn kiel laŭjurajn proprietaĵojn de la Eklezia Ŝtato tiranece per uzurpado li okupis; kaj kiel pli poste, kiam la perĵuran ribelulon samloke li sieĝis, ĉe kio li invitis lin, delasi de Ravenna same kiel de Pentapoliso kaj la tuta Eksarĥato, kaj kiel pere de sendito li transdonis lin al la Sankta Roma Eklezio kaj Papo Stefano.

Mi ne bezonas memori, ke la tre potenca Dukon de Akvitanio Vajfarion li tute venkis kaj neniigis, kaj kiel al la „fortnuka“ kaj nevenkita popolo de l' Saksoj post ilia submetiĝo kaj klara venkiĝo li surmetis ĉiujaran tributon de po 300 ĉevaloj. Plej kongruas kun lia grandeco la juĝo, kiun vortigis Pompejo Trogo pri Aleksandro la Granda: „Kun neniuj el siaj malamikoj li iam konsentis pri interbatalo, sen el tio aperi kiel venkinto, neniun urbon iam li sieĝis, sen konkeri ĝin, neniun popolon li iam renkontis sen meti ĝin en la polvon.“

Sed se ĉi tiuj tiel gloraj, tiel eminentaj ebloj, diskonigi siajn grandajn titolojn, ne ekzistus, tamen super tio ja ekzistus la profetaĵoj pri la grandeco, nome ke li kiel unua la Romian potencon transportis al la Gaŭloj, ke laŭ la Providenco de sia Sinjoro Kristo li generis kiel lumon Karolon la Grandan, kiu per la grandeco de sia gloro la limojn de sia potenco kaj de sia famo limigis per tiuj de la Oceano kaj la steloj⁶⁵, kiel ĝis nun en la buŝo de ĉiuj tra la tero li estas glorata, kaj ke laŭmerite la gloran titolon de Cezaro Aŭgusto li ricevis, kaj tiun titolon postlasis al siaj heredantoj.

Kaj sendube, por ke la profetaĵo estu neskuebla, la patro metis la fundamentojn por tiu regado, sed la filo kompletigis la gloron de tiu tutaĵo, kaj el iu tiel forta radiko kaj la densa funde radikiganta semo aperis arbaro da reĝoj kaj regantoj ĝis la plej venkanta kaj kompatema Imperiestro Henriko la 4a, sub kies regado ni skribas ĉi vortojn. Per natura disbranĉiĝo de l' geneologio longa linio kondukas al Ludoviko, fama Reĝo de l' Frankoj, patro de Reĝo Lotario kaj de Duko Karolo, kies filinon edzinigis Konrado, la Reĝo de Burgonjo, el kiu li naskis la avinon patroflankan, nome

⁶⁴ 749-756, per la konkero de Ravenna en 751 li finis la Eksarĥaton de Bizanco kaj samtempe minacis Romon.

⁶⁵ Vergilio – Eneado 1:287: ke naskiĝos Cezaro kies landoj limos al Oceano kaj Steloj.

la patrinon de l' imperiestrino, Giselan, piamemore, kiu siavice estis la patrino de l' fama Imperiestro Henriko la 3a. Senerare la granda, en la plej kaŝitaj kaŝitaĵoj ensekretigita pastro rekonis, ĉar li estis unuspirita kun li, kaj defore same kiel deapude trafite, la veron li diris pri tiu filo ĉe la bapto de la renaskiĝo, la verecan profetaĵon li vortigis pri la glora brilo de lia posteularo.

Ne nur ĉe la profetado pri tiel granda posteularo, sed ankaŭ koncerne lian propran ripozlokon ne per nuraj vortoj, sed per faroj li montris, ke li larĝe disponis pri profetaj kvalitoj.
